

# PENSEO

*N-ro 379*

*maj. / 2023*

Monata Beletra Revueto en Esperanto  
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 34-a jaro <http://www.elferno.cn/penseo/penlisto.htm>

## Tiberio Madonna (Italio)



### Sen ni

La floroj  
 en la mallumo  
 ne havas kolorojn  
 kaj la luno  
 defalinta en la malamon  
 perdis la helecon.  
 La suno  
 kiu brilegos morgaŭ matene  
 pli eta ol oranĝo  
 pluvigos  
 sian acidan sukon  
 sur niajn okulojn  
 soifajn  
 kaj bruligos  
 kiel senutilajn paperaĉojn  
 la sonĝojn  
 kvankam jam cindriĝintajn.  
 Kaj kiel faros intertempe  
 la nokto  
 por trinki la tutan akvon  
 de ĉi freneza  
 fulmotondro  
 kaj viŝi la nubojn  
 malkovrante  
 ke ĝi perdis la lunon?  
 Kie ni trovos  
 helfarban pentraĵon  
 por povi eniri kaŝite  
 kaj promeni en ĝi?  
 Horloĝoj kaj kalendaroj  
 diras nenion plu  
 al niaj fantazioj

kaj l' atendoj  
 longaj  
 lacigantaj  
 kaj dolĉaj  
 dronis  
 kun siaj falsaj promesoj  
 en unu guto  
 da fumo.  
 Kion ni diros  
 al niaj koroj  
 kaj kion ni rakontos  
 al la emocioj?  
 Aeron  
 silentojn  
 kaj pluan aeron  
 plenigitan per vakuo. De vi.



## Maria Nazaré Laroca (Brazilio)



### Eltrovo

Dum la infanaĝo  
 mi estis princino,  
 kaj loĝis en kristala palaco.

En ĉi aŭtuna majo,  
 sepdek kvin jaraĝa mi estos,  
 sed nur nun mi certas  
 pri tio, ke mi loĝas  
 ene de vitra korpo,  
 tre rompiĝema dometo.

Malgraŭ doloroj kaj sortoŝanĝoj,  
 ĝi estas mia hejmo:  
 tranĉita, polurita gemo

de l' "potenca senkorpa mistero."

*Juiz de Fora, 24/03/2023.*

***La 21-an de aprilo en Ouro Preto,  
1967***

(Honore al Tiradentes)

Mortis homo,  
jen festotago.  
Sur ĉiu fenestro  
vazo da floro.  
Pafiloj leviĝas  
ĉe placo ornamita,  
kunpremiĝas homoj:  
malplena brakumo.

Mortis homo,  
jen festotago...  
Kaj tiom da flagoj  
flirtantaj en la aero...  
Kaj jen la rajdantoj  
kun plumoj ruĝaj,  
glavoj en la zono  
kaj poŝoj malplenaj...  
Impetaj soldatoj  
en festo kolora  
celebras la krimon  
de siaj prapatroj...

Eksonas tamburo,  
kaj kantas koruso,  
tiam ekparolas  
la Guberniestro.

L'antikva Ouro Preto  
je homoj plenplenas:  
mil kruroj, mil brakoj,  
mil manoj obscenaj  
kraĉantaj parolojn,  
kiuj vundas profunde,  
disŝiras la karnon  
de virgaj preĝejoj.

Ĉevaloj el fajro  
levas la polvon,  
per vento alportas

guston de sango...

Eĥiĝas denove  
la tambura sono,  
dum en la templo  
baroka anĝelete  
rigardas la homojn  
sen ajna kompreno.

Muziko funebras,  
ĉe ĉiu batado  
mi memoras alian  
longe en la tempo,  
ankaŭ malĝoja,  
kaj homo marŝadis  
survoje al morto...

Lerneja parado  
de gejunuloj  
supreniras deklivon,  
en la placon eniras...  
Foiro junulara  
el marionetoj  
la farson pretigas.

Finiĝis la festo.  
Foriras la homoj.  
Revenas la nokto  
el senfina nasko,  
vestante Ouro Preto,  
por ĝia funebro.  
Dum sur la bluo  
steloj obstinaj  
insistas prikanti  
pacon mensogan.

*El la portugala originalo tradukis Maria Nazaré de  
Carvalho Laroca.*

*Juiz de Fora, 19/04/2023.*

**Ángel Arquillos (Hispanio)**



*La viva estas mistera*

La vivo estas mistero!  
Ni naskiĝas kaj kunvivas

ĉe tenera familio.  
 Ade ni ĉiutage serĉas  
 la misteran, efemeran  
 novan kaj eternan vivon  
 transe de ĉielaj limoj.  
 La gepatroj rekomendas  
 ke ni sekvos la konsilojn  
 de instruistoj kaj kleruloj,  
 sed ne ĉiuj kaj ne ĉiam  
 al ni, libervole helpas  
 kun la sama harmonio.  
 Kelkaj saĝuloj fiaskas,  
 kelkaj amikoj perfidas  
 kelkaj aliaj foriras  
 kaj ni kun soleco restas.  
 Ŝajnas al mi ke la vivo  
 tre similas al la sorto  
 aŭ plibone, kara amiko  
 al la terurega morto.

## Moissej Bronshteyn (Rusio)



Forflugas nube, ve, la viv',  
 sed ĉiu majo  
 min benas per la perspektiv'  
 de nova gajno,  
 ĝin donos nepre la labor',  
 farata pene  
 dum la vintrego taŭga por  
 mediti bene  
 pri trafo ĉe l'printempa sun'  
 al dolĉaj retoj,  
 kien min laŭte vokas nun  
 miaj floretoj.

\*\* \*\*

Fetoro de l'milito  
 ĉi tien venas febla,  
 apenaŭ perceptebla  
 kiel antikva mito.

Sed pli kaj pli stumbligas  
 fetoro de l'mensogoj –

pli ol plej fortaj drogoj  
 ĝi la popolon ligas

al kred' je nekredebla,  
 monstreca ĉe apero,  
 kriplega duonvero.  
 En ĉiu cerbo febla

nestiĝas nur kolero  
 kontraŭ malamikaro,  
 kaj nur al murda faro  
 pretigas duonvero,

ekregas apatio...  
 Kaptante la okazon  
 mi diru: — Ŝtopi nazon  
 ne helpas kontraŭ tio.

\*\* \*\*

Favoris min fortun',  
 vanteco kaj venteco,  
 memfid' de milda speco  
 direktis en la jun',  
 kaj mi impetis kun  
 laŭeble laŭta krio,  
 revante pri nenio,  
 krom flugo al la sun'.  
 Oldiĝis mi, kaj nun,  
 kuŝanta surdivane,  
 mi pensas, ke ne vane  
 min trafis deca pun',  
 en mia viv-aŭtun'  
 la disreviĝ' prudenta  
 anstataŭ revo venta,  
 gumtolo, ne katun'.  
 Sed foje sent-tajfun'  
 en la memoro levas  
 ŝaŭmadon, kaj ekmevas  
 de l'grizo al la brun'  
 eĉ se sen oportun',  
 en plena malkomforto  
 libera mia vorto,  
 kiun mi flegas nun.



## Klaus Friese (Germanio)



### Printempa

Nun floras la pomarbo.  
La vintro estas for.  
Printempa freŝa farbo.  
Printempa flor-odor'.

Varmaj sunradioj tuŝas  
vian haŭton kun abund'.  
En la mola herb' vi kuŝas.  
Ĝoju pri ĉiu sekund'.

Senĉese pepas birdoj nun.  
Belega la prezent'.  
Ne estas nuboj, nur la sun'.  
Printempa firmament'.

### La amo-vorto

Franclingva vort' estas l' amour,  
trovebla en literatur'.

La angloj simple diras love,  
facile skribas stenograf'.

Vi nur bezonas tiun vorton  
en ĉiuj lingvoj de la mond'.  
Bone influu vian sorton.  
Vi mirus baldaŭ pri l' respond'.

Koreoj flustras nur sarang,  
ja tiu vort' ne estas slang'.  
Láska, estas ĉeĥa esprim',  
sed diru tion nur sen tim'.

Forgesu ne, ke en Kenio,  
en ĉiuj lokoj de la land',  
mapenzi estas ĉiam ĉio.  
Pri tio mankas la demand'.

Pliajn ekzemplojn serĉu mem.  
Hungaroj vokas szerelem.  
Prononco estas la problem'.

## Vizito al la zoo

En la bela zoopark'  
loĝas ne nur tigroŝark'.  
Tie vivas kanguru',  
urso kaj la kakatu'.  
Tial venas vizitant'.  
Tion scias elefant'.

Kiam, kiam, onklo Ĵon?  
Por l' bilet' kiom da mon'?  
Petas Petro sen pacienc'.  
Tamen estas konsekvenec'.  
Tranĉu heĝon kaj eĉ pli',  
Vi laboru nun por mi!

Petro jesas sen grumblad'.  
Grava estas nur persvad'.  
Ek al l' zo' kun la bilet!  
Onklo plendas pro l' buĝet'.  
Petro gaje saltas nun.  
Lin favoras la fortun'.

Blanka urso kaj azen'  
ĝojas en la bestĝarden'.  
Petro kaj orangutang'  
ambaŭ klakas per la lang'.  
Li sidiĝas apud ĝi.  
Jen amik', ne fantazi'.

Ambaŭ fiksrigardas nun,  
lumigitaj per la sun'.  
Harmoni', sen iu paŭz'  
inter du, pro kia kaŭz'?'  
Estas vera amikec'  
malgraŭ la alia spec'.

Iru nun, venu kun mi!  
Estas onkla opini'.  
Petro volas resti nur.  
En la zo' estas plezur'.  
Vera estas nun la fakt'.  
Du amikoj en kontakt'.

## Saulo Salgado Wanderley (Brazilo)



### Esencaferoj

Esencafero, laŭ mia opinio,  
estas estigi de paco linion,  
estas transiri la ombron kaj timon,  
estas kunvivi en mondo sen limo!

Esencaferoj – ho, fratoj de l’Mondo! –  
ene similaj tra nia Planedo,  
bele kaj ĝoje, kaj tute sen tedo,  
estas kunkrei de l’Amo la fonton!

Esencafere, “Zamen” sekvante,  
pro Paco kaj Vero, ni laborante,  
faros la Mondon de Li plej revata:

de tre diligentaj homoj plenita,  
sur bazo egalrajta tute formita,  
ĝi estos la ujo de Dio amata!

*Candeia*

## Wally du Temple (Kanado)



### Fratino Kolibro

*El Konsiloj de Indiĝenaj Scioj*

Floron morfis korako magia  
al kolibro, por ĉiela arko sia,  
respektata kiel feroĉa batalant’  
de sankta belo, zumzumanta defendant’  
vojaĝa aŭguro, por la forir’ bonŝanc’  
premio por labor’, suĉfloro la donac’  
Soru supren—suben, iru ajndirekten  
flanken—rektan, ŝvebu, iru malantaŭen  
Akceptu amon, ora dolĉa la nektar’  
Estu tia birdo, de belo avatar’  
Ĉu el delica dulipa lonicero  
Ĉu el zinnio flaveca folisfero  
Imitu kolibron, via medikament’,  
Diskonigu ĝojon—tra via firmament’!



## Yohanes Manhitu (Indonezio)



### Distanco inter ni

Mi parolas al vi pri distanco  
ne ĉar mi tro ŝatas ĝin.  
Simple ĉar ĝi ekzistas  
inter ni ambaŭ.  
Sed kion signifas ĉi tiu distanco  
se nin kunigas la sama sento?  
Kilometroj signifas nenion  
kiam super ni regas amo.

## Petro Palivoda (Ukrainio)



### Violonisto

(kantteksto)

Solviĝas en muzik’ esenco mia,  
per ondo kolizias kun etero,  
leviĝas super falso, super vero –  
kaj for de l’ universo materia.

Forviŝos mi por ĉiam homajn limojn,  
al mi etendas manojn milionaj.  
Fluadas mi: ĉu bono, ĉu malbono –  
venen’, balzam’ inspiras la animojn...

...L’ vizi’ degelis, estas mi en ordo,  
nur infinito premas la memoron...  
Violonisto arĉas jam ne kordojn –  
sed mian koron.

### Folifala elegio

(kantteksto)

Melodio de l’ vento plu tristas,  
Oras pro foliaro la tero.  
Kaj nenio enmonde ekzistas,  
Sole ĉi folifala vespero.

Estingiĝas espero kaj flamo,  
Grizaj nuboj kovradas la sunon.

Mi revenos al vi, mia amo,  
Iam en la plorantan aŭtunon.

Kaj kirligōs sub la firmamento  
Ornamaĵoj por la flava balo.  
Kun folioj portataj de l' vento  
Ni valsados en la folifalo.

Sonas de la aŭtun' elegio,  
Ploras nuboj, malgajas la koro.  
Kaj ekzistas enmonde nenio,  
Sole ĉi folifala angoro...

Etingiĝas espero kaj flamo,  
Grizaj nuboj kovradas la sunon.  
Mi revenos al vi, mia amo,  
Iam en la plorantan aŭtunon.

## Papos Nascentes (Brazilo)



### Konjunkcio

se en la etera sidejo kie loĝas  
poem' konsentiĝas memoroj de tiu vivo  
ripozuz porĉiame ĉe l' etero  
malkontentaj poemoj, la ceteraj  
tiujn mi ilin vestos: venu al Tero

dotata tamen de libera arbitro  
decidas la poem' kiun akceptas ĝi  
se ĝin mi kaĵolas per metaforoj kaj simboloj  
neon prov-ludas sed ĉe mi kuŝiĝas ĝi

ju pli tragedia kaj drama en l' origino  
des pli per lirismo mi ĝin ornamu  
des pli per Poezio ambaŭ plezuriĝu  
des pli ekestas amo, ekestas kap-turniĝo

leganto aŭ legantino kritikulo iĝas  
sia ĉarmo gourmet sin montras  
hezitas leganto ĉu kareso ĉu delico  
aŭ ĉu avide malsata ĝin devoras  
la poem' jam sen seks-honto jam sen jupo

sin scias Poezio kaj plene semantika diras:  
venu miele, min forpelu aŭ min defloru!

## Fonto

Akvo al via soifo,  
jen fluanta poezio,  
milda klara rivereto,  
sur konka mano kareso,  
vin satigas spongo-verso  
kiu daŭras malseketa  
kiam soifa vi revenos  
nov-karese vin banos,  
degutos kia suka gluto.

Poezio pogute servata  
spiron proponas laŭmezure  
eĉ disŝiraj animoj  
revigliĝante plenvivas!  
Venu, klara fonto spruĉas  
kvazaŭ senfina Vivo!

En via sino Fonto fluas,  
verso likve fluas,  
vorto onin varmigas,  
elfluas Sun-leviĝo,  
freŝa akvo subsune bolanta.

Poezio akvon proponas,  
ĉiu verso pura lum'  
spruĉas el via kor'.  
Fonto mem en via Esto  
ekestas Poezio-infano  
ĉiam sindonema festo  
spruĉas kanto fluanta.

## Jadranka Miric (Serbio)



### Vilaĝa idilio

Sur la alta fojno-stako  
sidis bela junulin'  
vid-al-vide virkoko  
kiu kokerikis avide.

Ŝi estis rigardanta  
 anasan familion naĝanta .  
 La malprofunda riveret'  
 vigliĝis onde . Restis akvospuro  
 forme—florete' .

## DOLORAS ANIMO

Fermita fenestro, en ĉambro via.  
 Premas dolore malhelo tia.  
 Silentas malhelo. Krias animsento.  
 Je ĉio fajfas vento!

Unu granda popolo  
 estas malice premita kaj punita.  
 Alia potenca lando agant-militas .  
 Eŭropo perdiĝis ĉiu eco.  
 En ĝi revigliĝis forgesita sklaveco!

En fi-milito tia  
 mortigitaj estas ne nur homoj en aro!  
 Atakita estas tradicio kaj racio!  
 Profitas nur Usona armilara industrio!

### Hans Georg Kaiser (Germanio)



## La knalo

Aŭdiĝis iam granda knalo  
 en iu pitoreska balo.  
 Ah, se ĝi estus vinofalo,  
 volonte estus mi la valo.

Sed estis tamen granda knalo  
 kaj tute ne nur sektsignalo.  
 Kaj tial nun eĉ generalo  
 post puĉo tronas en la halo.

## La pensoj liberas

(germana popolkanto)

1

La pensoj de la hom'  
 liberas kaj restas,

laŭ nokta fantom'  
 kaŝitaj ja estas.  
 Ĝin hom' nek divenas  
 nek ĉenoj katenas.  
 Do restas laŭ senc',  
 ke liberas la pens'!

2

Mi pensas kun plezur',  
 kverelojn evitas.  
 Sekrete mi nur  
 pri ĉio meditas.  
 Dezirojn — vi sciu —  
 malhelpas neniu,  
 ja restas laŭ senc',  
 ke liberas la pens'!

3

Se iu ĵetos min  
 karceren permane,  
 mi simple diras lin:  
 “Vi agas ja vane.  
 La pensoj trapasos  
 kaj murojn frakasos  
 per forta potenc',  
 ĉar liberas la pens'.”

4

Kaj tial ĉe la fin'  
 mi zorgojn forŝovu,  
 ke vivgojo min  
 do daŭre plu movu.  
 Mi povas sentime  
 beati anime  
 laŭ sento kaj mens',  
 ĉar liberas la pens'!

tradukis Hans—Georg Kaiser surbaze de traduko  
 de B.Klatil

### Ivanichka Magharova (Bulgario)



Vespera nebul'.  
 Memoro el l'pasintec'  
 varmigas animon.

Ekblovis l'vento.  
El la nuboj ekŝprucas  
najtingala kant'.

Aŭtun'sunsubir'.  
L'maro enprofundiĝas.  
Luno leviĝas.

Monta riveret'  
blankaj ŝtonoj briletas.  
La rano saltas.

En vintra vesper'  
paŝoj vekas l'silenton.  
Ŝi jam foriris.

En frosta nokto.  
Blanka kolomb' sur  
kornic'—  
bonajn novaĵojn.

## Neĝa blovado.

Sur la arbara pado  
du paŝojn en neĝ'.  
Malgrandaj neĝeroj  
milda vintra anoncisto  
kisas la teron.  
En la fenestro  
steloj. Klarneto ĝemas.  
Bela neĝa nokt'.  
Neĝo. Blus'. Kamen'.  
Virino sur la vojo.  
L'silent' ekbrilis.  
Blankaj sonoriloj  
subtera pepado  
spiro de printemp'.  
Autun'. Folifal'.  
L'arbar' ree ekdormis.  
Oni blankiĝis.  
Meznokta bluso  
Sur la fenestro frapas.



## Elena Popova (Bulgario)



## Galopu, ĉevaloj!

Ludas mi en la ondoj,  
kun perloj ili min ornamas  
kaj la sun' min karesas.  
Estas mi naĝanto sukcesa.  
Galopu, kruroj miaj,  
premion mi promesas.  
Haltas la ond' je la bord',  
sed ne estas bar' kaj doloro  
pri la sentima koro.  
Kun forta volo ja mi estas.  
Tint'.. . Tint'...— la tintil' jesas,  
baldaŭ ni venkon festos!

## Dio estas amo

Li estis Amo  
krucumita kaj neita.  
Spirito de l' Tero  
Li iĝis. Kaj nin  
donacis kun Am' vera.  
Kristo perfidita suferis  
kaj por ni sin oferis.  
Ĉiu sian krucon  
devas mem porti  
humile kaj senvorte.

## Rita Mkrtĉjan (Armenio)



## En unu neĝa tago

(mikronovelo)

En lernejo, la instruistino donis al ĉiuj taskon skribi ekzercan verkon pri neĝa tago. Peter eksidis ĉe tablo, antaŭ fenestro en sia ĉambro, kaj malfermis kajeron. Hejmanoj paroladis mallaŭte, ĉar filo preskaŭ neniam sidis por prepari hejmajn taskojn.

Unua frazo jam estis skribita — Neĝas...

Peter spektis belajn neĝerojn kaj imagis, kiel la instruistino laŭdos lin ar li skribos



plej bonan verketon.

Li tre ŝatas vintron, ŝatas, ĉar Meri, lia samklasanino, atentis lin nur kiam li malforte batas ŝin per neĝbuleto. Ŝi ridas kaj diras al li — Peter...

Finon de la frazo li jam ne aŭdas, sufiĉas, ke ŝi alvokas lin laŭ nomo.

Neĝas...

— Kia hela tago, kiel beliĝis arboj, ŝajnas, ke la urbo transformiĝis en iu mistera neĝa regno, — pensis Peter.

Nerimarkeble alproksimiĝis tempo por iri al lernejo.

— Peter, ĉu vi finis skribi hejman taskon, — demandis patrino.

— Jes, vikle respondis Peter kaj fermis la kajeron, kie estis skribita nur unu vorto — Neĝas...

## Preskaŭ vera historio

Ili konatiĝis dum la Universala Esperanto-Kongreso, kiu okazis antaŭ dudekkvin jaroj, en unu el Eŭropaj urboj. Ili ne parolis pri la sentoj, ne diradis amajn vortojn, sed ĉiutage kune promenadis, havis komunajn temojn de konversacio, estis feliĉaj pro konatiĝo. Ili promesis renkontiĝi ĉiam, kiam okazos ebleco partopreni UK-n.

Poste ili korespondadis per leteroj, lastatempe jam per reto. La korespondado ne estis ofta. Kiel kutime faras multaj homoj, ili ambaŭ enmetis en F-n foton de junaĝo.

Ŝi ne sciis, havas Li familion, edziĝis aŭ ne, sed pensis, ke jes. Neniam, en mesaĝoj ŝi ion demandis pri lia persona vivo.

Tiel okazis en vivo, ke ŝi ne renkontis sian “princon” (alian kandidaton ŝi ne akceptus) kaj restis sola.

Kaj jen — laŭvica UK, ĉiu mallonga mesaĝo enhavis ĝojajn vortojn, ke ili revidiĝos dum malfermo, en Kongresa halo.

Multaj jaroj Ŝi gardis belegan verdan pupeton, kiun donacis li.

En mesaĝo ŝi skribis, ke la pupeto estos en ŝiaj manoj.

Jen alvenis la tago, kiam ŝi kun amikinoj alveturis urbon, atingis hotelon kaj post kelkaj horoj de ripozo, eniris Kongresejon.

La pupeto estis en la sako. Ŝi elprenis ĝin kaj eniris halon.

Ŝi estis sufiĉe simpatia por kvindekkvin jaraĝa virino. Kompreneble, la jaroj ne estas bona amiko por ĉiuj homoj, tamen ĉiu virino revas, atendas komplimentojn, bonajn vortojn, ne gravas, homoj parolas sincere aŭ ne.

Kiel ili interkonsentis, Ŝi atendis lin ĉe unu el enirejoj, sed poste decidis eksidi en loko, de kiu ekpovus vidi ĉiujn, kiuj eniras.

Ŝi proksimtempe ekvidis lin. Li preskaŭ ne ŝanĝiĝis, ĝenerale, virojn la tempo kompatas. Kun sia, tiel konata rideto, li salutis samideanojn kaj, rigarde serĉis ŝin. Lia rigardo observis ĉiujn, tutan vicon de seĝoj, ŜIN... kaj, daŭrigis la vojon malsupren.

Kelkaj minutoj li staris apud ŝi kaj... malsupreniĝis. Ŝi preskaŭ ŝtoniĝis sur seĝo kaj havis nur unu penson: “Li ne ekkonis min”. Ŝi vidis lin, vidis, kiel atenteme li serĉis ŝin inter ĉeestantoj.

Ŝi ekstaris kaj, ne scias kial, ŝanĝis la lokon, voje transdonis pupeton al iu infano, kiu kun gepatroj eniris halon.

Ĉiuj aplaudis, komenciĝis malfermo de UK. Ŝi iomete trankviliĝis kaj petis amikinojn, ke, se iu demandos pri ŝi, respondi, ke ŝi forestas pro okaza malsano. “Li ne ekkonis min”—batadis penso la kapon.

Tamen ŝi ne pensis, ke io povus neniigi la ĝojon de UK-partopreno.

Kiam li skribis kaj demandis, kie ŝi estis, ŝi respondis, ke ege bedaŭras pro foresto, eble venontan tagon ili renkontiĝos, sciante, ke nek morgaŭ, nek postmorgaŭ ĉi tio ne okazos. Ŝi pensis pri tio, ke en amaso de

partoprenantoj povas libere ĉeesti, ĉar li ŝin ne ekkonis.

Ĉi tio ne estis tragedio de la vivo, sed estis fino de la juneco en Esperantujo, fino de sensencaj revoj kaj... aperis kompreno, ke ne eblas vivi per pasinteco.

## Yi Qiao (ĉino en Germanio)



### Paskinsulo

Resurektis Paskon la Sinjoro,  
en la bunta lumo de aŭroro.  
Ho, lilioj paskaj sankte floras,  
kun aromo sur kampar' fervoras.

En preĝejo ni pilgrimas kore,  
Dion klinsalutas ni adore.  
Meditadas ni en paska kanto,  
La Sinjoro restas homsavanto.

Paskinsul' antikva foras zone,  
Statuegoj staras jen impone.  
La potenco dia nin inspiras,  
Ni eternan vivon fidsopiras.

### Nubo el hejmloko

Nubo el hejmloko ŝvebas en ĉielo,  
mi estas vokata senĉese.  
Venteto ĝentile ekblovas en helo,  
tiu voĉo al mi flustras karese.

Hejmenvenu, kara  
vaganto migranta ĉie.  
Hejmenvenu, kara  
samlokano, ne plu vagu senracie!

vojaĝa paŝado ŝajnas peza,  
pad' revena estas kun rigoro.  
Milde blovas briz' karesa  
kun hejmloka tera bonodoro.  
Mi marŝadas pene laŭ la voko,

okuloj tutplenas de larmo amara.  
Brizo kaj nubaro el hejmloko  
min sanigas de vundo plurjara.

Iam mi heroe ambiciis ankoraŭ,  
nenion havas mi nun preskaŭ.  
Brizo kaj nubaro el hejmloko  
Konsolas min per la korvoko.

*Yi Qiao tradukis ĝin laŭ la ĉina samnoma kanto.*

## Alma Papamihali



### Virino

Priskribi vin, Virino, ho virino,  
oni devas bone koni ĉiujn viajn ĉarmojn  
Kanti pri vi, ho majesta Patrino,  
Ne sufiĉas eĉ la vivo, por diri ĉion.  
Paroli pri vi, Fratino mia, rarulino  
Restas senfina rivero, malgraŭ la vorta  
fluado  
En la viva vojo, valora Amikino,  
Estas ja etendita mano, sole neniamfoje.  
Tiam, Filino, kiam Dio enmanigis vin al ni  
Krom Virino, Fratino, vi estas ja benita  
Patrino.

*Elalbanigis*



## Bardhyl Selimi

(Albanio)

## El Ĉina Antikva Poezio

### Jiang Kui (1155—1226)

—laŭ melodio *Ruĝigitaj lipoj*

Sovaĝanseroj el la nordo  
forflugas jen kun nuboj al la foro  
de l' okcidenta bordo de la lago.  
Nur restas montoj en kvieta sensoro,  
do, kiuj ŝajne ja komplotas pri la pluvo  
vespera, kiu falos flirte kun langvoro.

Ĉe l' kvara ponto vivis la ermito,  
 kiun mi tenas respektplene en memoro.  
 Mi vere emus vivi kune kun li,  
 sed kie li troviĝas nun en solo?  
 Min apogante al la balustrado,  
 sopiras mi al antikvaĵoj kun rankoro.  
 En la vidkamp' nur salikarboj  
 vergetojn svingas en gracia folo.

### *Sonĝo je la nokto de Lanterna Festo*

#### —laŭ melodio *Perdrika ĉielo*

Fej-rivero fluas ja senĉese orienten,  
 aman semon mi ne devus ĵeti simplanime.  
 En ĉifoja sonĝ' figuro ŝia pli malklaras  
 ol en portreto ŝia — vidas mi deprime.  
 En mallumo mi vekigis ja pro tio,  
 ke montbirdo krias ŝajne de proksime.

Junaj herboj ne ankoraŭ ekas kreski,  
 miaj haroj tamen ekblankiĝas glime.  
 Antaŭlonga la disiĝo min ĉagrenas  
 ne profunde nek senlime  
 pro sensenta koro mia.

Tamen en ĉi tago ĉiujare laŭkutime  
 ambaŭ ni silente primeditas  
 nian amon tiujaran kor-esprime.

#### —laŭ melodio *Perdrika ĉielo*

En la urb' sin trovas belulino  
 senegala,  
 kia vent' alportas vin en loko  
 vulgara?  
 Vi paŝadas kun ŝtrumpetoj sub la jupo  
 pezefala,  
 kiel ja fein' gracia en altira pozo  
 senrivala.

Vi ridetas, kial via frunto estas  
 sulkigita?

Kiu vivas kun vi en printempo  
 iom frida?

Ne ambirdoj emas vivi eĉ en  
 solo sida,

Jen prefere ili transformiĝi kiel  
 nub' flug-glita.

## Spektado al lanternoj

#### —laŭ melodio *Perdrika ĉielo*

Pejzaĝ' sur stratoj dum Lanterna Festo  
 provizas la riĉulojn per spektada ĝu'.  
 Antaŭ ol ili iras el la domo,  
 ĉevaloj iliaj henas per surdiga bru'.  
 Ordinarulo mi kun blankaj haroj,  
 alvenas spekti la lanternojn, nu,  
 sen ajna servoknabo kune,  
 nur mi kaj mia filineto du.  
 Kaj l' lasta rajdas ja sur miaj ŝultroj,  
 ĝojplene murmurante kun senĉesa sku'.

Lanternoj pendas jen laŭ stratoj,  
 la lun' prilumas la spektantojn plene.  
 Mia juna energio jam forŝvenis,  
 kaj nun mi maljunulo tristas ja ĉagrene.  
 En la printempa malvarmet' sur  
 riverbordo,  
 post spektado oni hejmeniras jen  
 promene.

#### —laŭ melodio *Kora sento*

Oriente de la pont' falintaj granatfloroj  
 ruĝe farbas rojon plene.  
 Ĉe la Drakboata Festo\*  
 la paseoj bolas en mi ja ĉagrene.  
 Monta pluv' senĉese vipas  
 la tegmenton de l' boato ĝene.

Konas mi sukcesojn, perdojn de la mondo  
 kaj decaĵojn, misojn en agmaniero,  
 sed mi ĉiam dronas en ĉagrenoj.  
 Nun mi jam blankharas en la viv-vespero,  
 nur pentante pri vanigo al l' epoko pompa  
 kaj erarvagado en malbrila kariero.

*\*Drakboata Festo okazas la kvinan de la kvina monato laŭ ĉina lunkalendaro, omaĝe al la granda poeto Qu Yuan (340-278 a. K.).*

*Elĉinigis*



**Vejdo (Ĉinio)**

Shi Runzhang (1619 — 1683)

## *Survivo al hejmloko*

Ĉe l' ŝtona bordo de sinua fluo  
malnovaj arboj laŭ la muro staras.  
Sovaĝaj rojoj kunas inter montoj,  
vilaĝon presikfloroj el si faras.  
Vokitaj kokoj pasas tra verg—heĝo,  
genepoj l' avon taste nun regalas.  
Ermito, oldiĝante, mi fariĝos,  
ĉar monto ja al mia dom' najbaras.

Wang Shizhen (1634 — 1711)

## Pejzaĝo en Zhenzhou

Preskaŭ fiŝistoj loĝas riverborde, kaj kabanoj  
disas ĉe vojo flanke de salikoj, akv-kaŝtanoj.  
La suno nun subiras kaj blovetas milda  
vento,  
aceroj ruĝiĝantaj eĥas kriojn pri perk-vendo.

Zha Shenxing (1650—1727)

## Nokta vidaĵo

Fiŝboata lampo brilas, en malluma  
nokto, kiel sola punkto de lampiro.  
Sur rivero glimas steloj dismetitaj,  
la ondetoj agitiĝas de zefiro.

Qu Fu (1668 — 1745)

## Improvizado

Por centoj da moneroj oraj  
aĉeti ĉevalon ja bonan,  
belinon kaj eĉ altan rangon.  
Sed kie junecon imponan?



*Elĉinigiŝ*



**Minosun (Ĉinio)**



# Zhuangzi

ĈAPITRO TRIDEK-DUA

## Liezi

### §32-06

La duko Ai de la regno Lu demandis Yan He:

“Se mi faros Konfuceon unu el miaj ministroj, ĉu tiam mia regno sin trovos esperplena?”

“Tio estos katastrofa, tre katastrofa!” respondis Yan He. “Danĝera estas Konfuceo! Li ĉiam donas troan atenton al la eksteraĵo, ofte donas malplenajn kaj malhonestajn parolojn belvortajn, emas sin okupi pri bagatelaj detaloj kaj distordas sian naturon por fari sin ekzemplo por la popolo. Antaŭ la publiko li mienas kiel honestulo por akiri fidon de la popolo, mem ne sciante, ke li estas nek saĝa, nek fidinda. Kiel tia hipokritulo povus gvidi la popolon de via regno? Ĉu Konfuceo vere taŭgas por la posteno de ministro? Aŭ ĉu li vere kapablas spirite nutri vian popolon? — Via konsidero ja estas absolute erara. Instigi vian popolon lerni hipokritecon ne estus la ĝusta maniero gvidi vian popolon. Por la bono de la posteuloj, estus preferinde por vi rezigni tiun ĉi intencon, ĉar Konfuceo estas netaŭga por la regado de la regno Lu.”

### §32-07

Fari bonon al aliaj kaj ne povi forgesi sian bonfaron, ne estas bonfaro el la naturo. Tian konduton eĉ komercistoj malestimas. Eĉ se oni estas devigita ĝin menci, en sia menso oni tamen ne serioze ĝin konsideras.

### §32-08

La instrumento por ekstera puno estas farita el metalo aŭ ligno; la instrumento por interna puno estas ĝuste la maltrankvilo kaj la memriproĉo. La korpa torturo sur krimulo estas farata per torturiloj; la spirita suferado estas la rezulto de la malakordiĝo de la jino kaj la jango. Nur tiuj, kiuj vere komprenas la Taŭon, povas esti liberaj kiel de la suferoj korpaj, tiel ankaŭ de la spiritaĵoj.

### §32-09

Konfuceo diris:

“La homa koro estas pli danĝera ol la alta krutaĵo, kaj pli malfacile konebla ol la ĉielo. Ĉar la ĉielo havas siajn regulajn ciklojn de la kvar sezonoj kaj la alternadon de la mateno kaj la vespero, dum la homa vizaĝo estas mistere nekonebla kaj la homaj sentoj estas nesondeblaj. Iuj, kiuj aspektas honestaj, estas plenaj de aroganteco interne; aliaj, kiuj aspektas kiel respektindaj pliaĝuloj, nutras en si malbonajn intencojn; ankoraŭ aliaj, kiuj aspektas obeemaj kaj rezerviĝemaj, estas interne firmaj kaj prudentaj; ankoraŭ aliaj, kiuj aspektas necedemaj, havas temperamenton molan; kaj ankoraŭ aliaj, kiuj aspektas timemaj, estas tamen bravaj. Jen kial homoj serĉas la humanecon kaj la justecon tiel avide, kiel soifanto serĉas akvon, dum en aliaj okazoj ili forkuras de la humaneco kaj la justeco tiel rapide, kiel oni evitas brulantan fajron.


“Tial oni povas submeti la noblulon al la jenaj naŭ provoj: nomumi lin al malproksima posteno por provi lian fidelecon; komisi al li oficon proksime por provi lian obeemon; trudi al li malfacilan taskon por provi lian kompetentecon; meti al li subitajn demandojn por provi lian inteligentecon; difini al li urĝan taskon por provi lian akuratecon; konfidi al li valoraĵojn por provi lian nekorupteblecon; meti lin en danĝeron por provi lian moralan

firmecon; drinkigi lin ĝis ebrieco por provi lian naturan teniĝon; meti lin en situaciojn, kie viroj miksiĝas kun virinoj, por provi lian rezistipovon al la virinaj ĉarmoj. Trapasinte la supre diritajn provojn, la homoj noblaj nature distingiĝas de la nedezirindaj.”

### §32-10

Kiam Zheng Kaofu ricevis sian nomumiĝon al ofico de la plej malalta rango, li ĉiam tenis la kapon mallecita al la homoj, kiujn li renkontis surstrate; kiam li poste estis nomumita al pli alta ofico, li klinis sian talion profunde; kaj kiam li estis nomumita ministro, li fleksis sian talion ankoraŭ pli profunde. Li ĉiam cedis la lokon al aliaj sur la vojo kaj rapide paŝadis laŭlonge de la muroj. Vidante, ke la ministro sin disciplinas tiel humile kaj modeste, kiu alia kuraĝus ne preni lin kiel modelon?

Sed la homo ordinara kondukas alimaniere: se li estas nomumita al ofico de la plej malalta rango, li fariĝas aroganta; se li estas nomumita al pli alta ofico, li sovaĝe dancas eĉ en sia kaleŝo; se li ricevas la nomumiĝon al ankoraŭ pli alta ofico, li komencas malestime voki sian onklon per lia persona nomo. Se ĉiu kondutos tiamaniere, kiu do povos esti tiel humila kaj honesta, kiel la reĝo Tang kaj Yao?



*Elĉinigis*



**Wang Chongfang**

**(Ĉinio)**

# Ĉineske

## Yi Qiao (Ĉino en Germanio)

### Memoro de juneco

— laŭ ĉinesko *Aromplena korto*\*

Orepoko  
vivprintempa  
adiaŭis jam for.  
Ho juneco  
belis kiel flor?  
Amare kaj dolĉe  
ĝemas mi  
kun klarmemor?  
Sopire  
meditas mi  
en paca humor?  
.  
Aŭror?  
matena  
ora helas  
ĉe la deĵor?  
Printempa lumo  
en mia kor?  
inspiras ame min  
ankoraŭ  
kun la fervor?  
Pro tio  
la oldaĝo  
plenas de favor?

\**Aromplena korto* (ĉine: *mantingfang*): ĉina fikforma poemo el du strofoj kun 10 kaj 11 versoj de 446, 466, 7444 / 234, 454, 67345 silaboj, laŭ rimaranĝo *xxa,xa,xa,,xxa / ax,xa,xa,xa,xaa*

## Jadranka Miric (Serbio)

### Vintras Aprilo

— laŭ ĉinesko *Sopir-al-sudo*\*  
Aprila  
kvazaŭ temp' vintra.

Ankoraŭ ne aŭdiĝis  
komuna birdkanto tra  
branĉaro. Nur tra

fenestro  
oni ĝuas en  
frua printempa tago.  
Suno eliras alten.  
Montris sin honte.

Pluvegoj  
ĉesis. Ekstere  
blovas tre forta vento.  
Ĉielo bluis. Vere,  
same surtere.

Noktiĝis.  
Okulsignis luno.  
Al pasanto malfrua  
tre plaĉis pala lumo.  
Lampira Luno.

Venteto  
salutas forte  
noktan pasanton tre lin  
puŝante. Alivorte,  
per fi-ventsorte.

\**Sopir-al-sudo* (ĉine: *Yijiangnan*): ĉina fikforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo *xa,xa,xa (x=senrima)*.

## Laimundas (Litovio)



Ĉu esperantisto estas profesio?

La esperantisto estu ununura, serioza profesio, al kiu aspiru ĉiu homo. Kiam esperantisto pro sia aktivado en la Esperanto-movado ricevos sufiĉe bonan salajron, li/ŝi estos des pli fervora. Kaj ĉiuj ceteraj homoj, vidante utilon pro Esperanto, volos lerni ĝin.

Iun tagon, dum esperantista

klubkunveno, mi alparolis Simeonon, malnovan esperantiston-veteranon kaj demandis lin:

—De kie venis tiu malsaĝa eldiro „Esperantisto – ne profesio“? Eble de soveta epoko, kiam ĉiuj kredis, ke Esperanto estis la danĝera lingvo kaj esperantistoj- damaĝuloj?

— Dominiko, — li parolis al mi, — ne kunpuŝigu klerecon kaj moralon. Ĉu esperantisto estas malpli bona ol neesperantisto? La esperantisteco spontane, per si mem ne donas utilon. Ĉi tie plej gravas, kion vi ekzercis, kion vi trejnis — ĉu kapablon kalkuli monon aŭ kalkuli verdajn stelojn.

—Ohoho, diraĉis vi, — mi ekmiris.— Do, librotenisto laŭ vi estas bona kaj esperantisto malbona? Vi memoru, pri kio ni parolas. Ni parolas pri esperantisto, kiel profesio. Esperanto gramatiko nin instruas, ke sufikso „-ist-“ indikas personon, kiu profesie sin okupas pri la afero difinita en la radiko. Vaŭ! Do, esperantisto estas profesio same kiel kuracisto, artisto, traktoristo, poŝtisto, ŝtelisto, bankisto...ktp. Ĉu ne? Mi komprenas esperantiston, kiel personon, bone plenumantan sian devon. Ĉu tipa esperantisto devas kleriĝi, perfektigi?

—Nu, certe, li devas perfektigi,— kapjesis Simeono. — Tamen mi pensas, ke esperantisto antaŭ ĉio estu utila homo.

—Bone, — ĉifoje cedis mi, —tiam ni decidu, kio estas vera esperantisto? Ĉu tiu, kiu nur parolas, praktikas lingvon, aŭ tiu, kiu donas certan utilon al aliaj?

—Kompreneble, tiu lasta. Antaŭ ĉio, mi opinias, oni devas iĝi bona esperantisto, praktikanto de la lingvo kaj poste iĝi bona „librotenisto“, —respondis veterano Simeono. Mi tuj rediris:

—Mi konsentas. Estus bone, ke ĉiuj esperantistoj estu spertaj „de... ĝis...“. Tamen tio ne kredeblas, ne efektiveblas, — kontraŭdiris mi.

— Pro kio? , — ekmiris Simeono.

—Pro tio, ĉar esti „librotenisto“ ne estas deviga, nepra afero. Tio estas afero de persona libereco. Plej ofte sufiĉas, ke esperantisto estu sperta lingvoparolanto, — ne cedis mi.

—Do, kio mankas al vi?—ekkoleris veterano Simeono, — Kaj ĉu vi estas vera esperantisto?

— Eble mi estas vera esperantisto, ĉar mi volas, ke ĉiuj ceteraj homoj estu bonaj geesperantistoj. Kaj kion vi pensas? — scivolis mi.

—Mi ankaŭ estas vera esperantisto, ĉar mi komprenas, ke ne ĉiuj homoj povas esti bonaj esperantistoj, — parolis plu Simeono.

—Pro kio oni ne povas esti bonaj esperantistoj? — interesiĝis mi.

— Sed kiaj estas mezurunuoj de bona esperantisto? Kiel mezuri lin? Kie mezuri? — lavangis la demandojn Simeono.

—Mi ne scias. Bona esperantisto de malproksime spegulas..., videblas..., diferenciĝas..., — mi provis klarigi al li.— Bona patro, bona patrino, bona instruisto, bona najbaro, bona mi... Bonaj esperantistoj estas virtaj, memkonsciaj, konsciencaj, fidindaj, bonintencaj...,— mi perdiĝis inter miaj bonaj vortoj.

—Do jen, estas neniam difinoj kaj neniam konkretaj mezurunuoj, —iom pripensinte eldiris Simeono. — Bona esperantisto, samkiel bona homo, estas entute subjektiva nocio. Por unu homo tiu sama esperantisto povas esti bona, por alia — malbona. Ununura kriterio estas la efiko. Se mi ne instigas iun homon perforte lerni Esperanton, sekve mi estas bona por tiu homo, sed por vi mi jam ŝajnos malbona.

—Do vi pensas, ke sufiĉas al neniu trudi Esperanton kaj tiam vi estos bona? — demandis mi.

—Nome! Restigu ĉiujn en trankvilo. Ĉiu mem solvu siajn problemojn, siajn

